

Respondo al salutvortoj.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1984 decembro 06 kaj 08.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-136/Radiokasedo-136-1-852-1985-Claude-kaj-Andree-GACOND-Respondo-al-salutvortoj.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ni salutu hodiaŭ la geaŭdantojn, kies leteroj plenigas nian leterujon.

A.- Ni dankas pro iliaj vivsignoj Paul Bel en Carmaux, Francio, P. Zamani en Shiraz, Irano, István Nagy en Budapeŝto, Hungario, kiu preferas la vintran horsistemon, ĉar tiam li povas aŭskulti nin unu horon pli frue.

Cl.- S-ro Kondor skribis al ni el Romo, kie li feris. Lucien Giloteaux en Croix, Francio, sendas tre regule gazetaltranĉaĵojn sub formo de artikoloj pri esperanto, kiujn ni direktas al la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, por arkivado kaj konservado, kaj sub formo de artikoloj pri Svislando mem, ke ni povu vidi, kion oni skribas pri nia eta lando en Francio. Koncerne la elsendojn de Svisa Radio Internacia, li skribas, ke li ĉiam lernas ion novan.

A.- S-ro F. Poppeck salutas el la kongreso de la Turista Asocio de la Natur-Amikoj okazinta apud Strasburgo. Jacques Dony en La Ricamarie, Francio mencias, ke li aŭskultis nian prelegserion pri la Cseh-Metodo. B. Najbaro en Keighley, Britio rakontas, ke li lernis esperanton laŭ la Cseh-Metodo kaj ke en 1964 li havis la bonsorton ĉeesti en Londono seminarion, kiun gvidis Andreo Cseh mem. Josep M. Altadill en Tortosa, Hispanio, interesiĝis pri la Konsiloj de Andreo Cseh al la instruistoj.

Cl.- Koncerne tiun ĉi Cseh-Metodon, kiun ni modernigas en kunlaboro kun Mila Van der Horst-Kolinska, kunlaborantino de Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando, ni havas samtempe per-leterajn kaj per-radiajn rilatojn. En detala letero pri la Cseh-Metodiko, kiu respondis al same longa letero, kiun mi estis sendinta, Mila Van der Horst-Kolinska faras tiun ĉi mencion pri sia regula aŭskultado de niaj radio-prelegoj: "reage al viaj radio-dissendoj mi jam notis jenajn ŝanĝojn en la konsiloj de Andreo Cseh: 1) anstataŭ "grandaj benkoj" enkonduki "oportunaj sidlokoj", ktp... Kaj ŝi faras precizan demandon, kiu havas ĝeneralan intereson:

A.- "Interesas min via opinio pri punkto 24-a, kie Cseh instruas vortordon en la frazo kaj poste diras: "Mi faras solenan deklaron: Ĉiuj frazoj estas bonaj, ili estas tute egalaj. En esperanto la ordo de la vortoj estas libera. Regulo ne ekzistas."

Cl.- Antaŭ ol detale respondi al tiu demando, ni laŭtlege la koncernan parton de la punkto 24-a de la Gvidilo por kursgvidantoj praktikantaj la Cseh-Metodon:

A.- Andreo Cseh konsilas skribi sur la tabulon la frazon "Mi estas instruisto" kaj komentarii tiamaniere tiun ĉi frazon:

Cl.- Kio estas sur la tabulo?

A.- Sur la tabulo estas "mi estas instruisto".

Cl.- Ĉu ĝi estas vorto?

A.- Ne, ĝi ne estas vorto, sed ĝi estas frazo.

Cl.- Ĉu ĝi estas bona frazo?

A.- Jes, ĝi estas bona frazo.

Cl.- Sekvas noto, kiu diras: La tri vortojn la instruisto skribas aparte sur tri paperpecetojn, faldas ilin, ĵetas en ĉapelon, kirlas kaj proponas al la lernantoj, kiuj elprenas po unu paperon kaj legas la vorton.

Mi estas instruisto. Mi instruisto estas. Instruisto estas mi.

Instruisto mi estas. Estas mi instruisto. Estas instruisto mi.

A.- Kaj sekvas la ĉi-sekvan deklaron:

Cl.- Mi faras solenan deklaron: ĉiuj ses frazoj estas bonaj, ili estas tute egalaj. En Esperanto la ordo de la vortoj estas libera. Regulo ne ekzistas.

A.- Tion ĉi fakte diras nacilingve la tradukisto, ĉar la cseh-instruisto neniam krokodilas.

Cl.- Kaj s-ino Mila Van der Horst-Kolinska petas nian vidpunkton pri tiu ĉi deklaro. Ni do provu respondi:

A.- Gramatike ĉiuj ses frazoj estas ĝustaj, sed ne nepre bonaj. La unua MI ESTAS INSTRUISTO estas senreliefa, konstata. Ĝi estas la normala formulado.

Cl.- La dua MI INSTRUISTO ESTAS estas nekutima. Ĝi fakte reliefas la verbon ESTAS.

A.- La tria INSTRUISTO ESTAS MI reliefas la instruistan funkcion.

Cl.- Same estas por la kvara frazo INSTRUISTO MI ESTAS.

A.- La kvina ESTAS MI INSTRUISTO ankaŭ ne estas kutima. Oni vidus ĝin en kanto, sed ĝenerale sekve al alia diro.

Cl.- Fine la sesa ESTAS INSTRUISTO MI estas la plej nekutima frazo. Ni dubas, ke ĝin esperantisto prononcus en normala konversacio.

A.- Ni konsciu, ke Andreo Cseh verkis sian kurson en 1929, do antaŭ pli ol duona jarcento. Poste la atenta studado de niaj ĉefverkistoj konstatigis, ke el tiu libero gramatika oni faris ion rilate al la signifo-nuancigo. Esperanto estas lingvo, kiu povas reliefi ion, ĝuste utiligante la lokŝanĝojn de la vortoj en frazo, kiel ni ĵus konstatis, per la frazo MI ESTAS INSTRUISTO.

Cl.- Estas tre grave sentigi tion ĉi ekde la komenco de la instruado. Kiam Andreo Cseh metas la pronomon post la verbo en demandaj frazoj, li iel imitas la vortordon de la ĝermanaj lingvoj, por faciligi la instruadon de la lingvo. Li fakte verkis sian kurson dum instruado al svedoj. Sed tiu sistemigo trudas nekutiman vortordon kaj estas fakte danĝera.

A.- Estas fakto, ke en esperanto la subjekto ĝenerale sekvas netransitivan verbon kaj antaŭas transitivan. Andreo Cseh ne observas tiun ĉi statistike fundamentan regulon, kaj pro tio, liaj

lernantoj akiras la muzikon -as -on kaj metas poste la subjekton post netransitiva verbo en akuzativa formo! Ni donu ekzemplon:

Cl.- Por la verboj MANKAS, SONORAS, FALAS, esperanto emas lokigi la subjekton post la verbon. Oni diras: MANKAS PANO, SONORAS LA TELEFONO, FALAS LA FOLIOJ EN AŬTUNO prefere al PANO MANKAS, LA TELEFONO SONORAS, LA FOLIOJ FALAS EN AŬTUNO. Tiuj lastaj frazoj ankaŭ tute ĝustas, sed statistike ili maloftas. Sed la lernantoj, kiuj studis laŭ la Cseh-Metodo tendencas ne konscii pri tio, kaj ĉar ili asimilis la muzikon -AS -ON, ili tendencas fari la gramatike erarajn frazojn:

A.- MANKAS PANON, SONORAS LA TELEFONON, FALAS LA FOLIOJN EN AŬTUNO.

Cl.- Ĉiu metodiko naskas tipajn erarojn, kaj tiu ĉi, kiun ni ĵus menciis, estas unu el la plej negativaj rezultoj de la Cseh-Metodo.

Ekde la tridekaj jaroj ĝi infektis la esperanto-movadon en la landoj, kie la Cseh-Metodo havis grandan varb-efikon. Ĝi kreis dialekton en kiu la sama persono diras: PANO MANKAS kaj MANKAS PANON, LA TELEFONO SONORAS kaj SONORAS LA TELEFONON. Same tiuj esperantistoj ne komprenas, ke la tri frazoj, kiujn ni diras konklude al la hodiaŭa elsendo, havas tre malsimilajn signifojn:

A.- Paŭlo ne manĝis pomon. Ne Paŭlo manĝis pomon. Paŭlo manĝis ne pomon.

Cl.- Ekzistas reguloj koncerne la vortordon. Tiujn regulojn oni tuj malkovrigu al la lernantoj. Tion ĉi provas fari la Moderna Cseh-Metodo, kontraŭe al la klasika de la jaroj tridekaj. Pro tio la Gvidilo por kursgvidantoj de Andreo Cseh devas esti nepre reviziita.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos sian babiladon kun la geaŭdantoj, kiuj skribis. Ĝis reaŭdo!